# LA EPISTOLO ĜENERALA DE JUDAS

1 Judas, servisto de Jesuo Kristo kaj frato de
Jakobo, al la alvokitoj, amataj en Dio, la Patro,
kaj konservitaj por Jesuo Kristo: 2 Kompato al vi
kaj paco kaj amo pligrandiĝu.
3 Amataj, kiam mi faris ĉian diligentecon, por
skribi al vi pri nia komuna savo, mi deviĝis skribi
al vi, por kuraĝigi vin batali por la kredo, jam
per unu fojo transdonita al la sanktuloj. 4 Ĉar
enŝteliĝis iuj homoj, jam antaŭ longe destinitaj
por ĉi tiu kondamno, malpiuloj, ŝanĝante la gra-
con de nia Dio en diboĉecon, kaj malkonfesante
la solan Estron kaj nian Sinjoron Jesuo Kristo.
5 Mi do volas rememorigi vin, kvankam vi jam
per unu fojo sciiĝis pri ĉio, ke la Sinjoro, savinte
popolon el la Egipta lando, poste pereigis la
nekredantojn. 6 Kaj anĝelojn, kiuj ne konservis
sian regadon, sed forlasis sian propran loĝejon,
Li rezervis sub mallumo en katenoj ĉiamaj ĝis
la juĝo en la granda tago. 7 Kiel ankaŭ Sodom
kaj Gomora kaj la ĉirkaŭaj urboj tiel same, kiel
ĉi tiuj, malĉastiĝinte kaj foririnte post fremdan
karnon, estas elmontritaj kiel ekzemplo, sufer-
ante la punon de eterna fajro. 8 Tamen tiel
same ankaŭ ĉi tiuj en siaj sonĝadoj malpurigas
la karnon, malestimas aŭtoritaton, kaj insultas
honorojn. 9 Sed Miĥael, la ĉefanĝelo, kiam en
kontraŭstaro al la diablo li disputis pri la korpo

de Moseo, ne kuraĝis lin akuzi insulte, sed diris:
La Sinjoro vin riproĉu. 10 Sed tiuj insultas ja
ĉion, kion ili ne scias; sed kion ili per naturo
komprenas, kiel la bestoj senprudentaj, en tio ili
malvirtiĝas. 11 Ve al ili! ĉar ili iris sur la vojo
de Kain, kaj forĵetis sin en la eraron de Bileam
por dungopago, kaj pereis en la kontraŭdirado
de Koraĥ. 12 Ili estas la subakvaj rokoj en
viaj agapoj, kun vi kunfestenante, sentime sin
paŝtante; nuboj senakvaj, per vento disportataj;
aŭtunaj arboj senfruktaj, dufoje mortintaj, el-
radikigitaj; 13 sovaĝaj marondoj, elŝaŭmantaj
siajn hontindaĵojn; steloj vagantaj, por kiuj la
nigreco de mallumo por eterne estas rezervata.
14 Kaj al ili ankaŭ Ĥanoĥ, la sepa post Adam,
profetis, dirante: Jen la Sinjoro venis kun Siaj
sanktaj miriadoj, 15 por fari juĝon kontraŭ ĉiuj,
kaj por kondamni ĉiujn malpiulojn pri ĉiuj
malpiaĵoj, kiujn ili malpie faris, kaj pri ĉiuj
obstinaj paroloj, kiujn malpiaj pekuloj parolis
kontraŭ Li. 16 Ili estas murmuremuloj, plen-
demuloj, irantaj laŭ siaj voluptoj (dum ilia buŝo
parolas fanfaronaĵojn) kaj favorantaj personojn
pro profito.

17 Sed vi, amataj, memoru la dirojn antaŭe
parolitajn de la apostoloj de nia Sinjoro Jesuo
Kristo; 18 nome, ke ili diris al vi: En la lasta
tempo estos mokemuloj, irantaj laŭ siaj propraj
voluptoj malpiaj. 19 Tiuj estas la apartigantoj,
laŭsentaj, ne havantaj la Spiriton. 20 Sed vi,
amataj, konstruante vin sur via plej sankta fido,
preĝante en la Sankta Spirito, 21 konservu vin

en la amo al Dio, atendante la kompaton de
nia Sinjoro Jesuo Kristo por eterna vivo. 22 Kaj
unujn, kiuj ŝanceliĝas, indulgu; 23 kaj unujn
savu, eltirante ilin el la fajro; kaj aliajn kompatu
kun timo; malamante eĉ la veston makulitan de
la karno.
24 Kaj al Tiu, kiu povas vin gardi senfalaj, kaj
starigi vin senriproĉaj antaŭ Sia gloro en granda
ĝojo, 25 al la sola Dio, nia Savanto, per Jesuo
Kristo, nia Sinjoro, estu gloro, majesto, potenco,
kaj aŭtoritato, antaŭ ĉiu mondaĝo, kaj nun, kaj
ĝis la eterneco. Amen.

# Londona Biblio
## The Holy Bible in Esperanto (1910)

Public Domain

Language: Esperanto

2020-02-13

PDF generated using Haiola and XeLaTeX on 11 Nov 2022 from source files dated 13 Feb 2020
66d4141f-915d-52bc-b744-29459ca87515